No. 8, (1950)

# Ekonomia Egaleco

ORGANO DE „INTERNACIA ASOCIO BELLAMY
Jarabono 7 intern. resp. kuponoj.
Sidejo: Koningstr. 188, Beverwijk, Nederlando.

## LA PROFITULOJ

Fabrikanto estas antaŭ ĉio komercisto. Por ke kresku kaj prosperu lia entrepreno, necesas ke la investita kapitalo estu profitdona. La celo estas ne la produktado favore al la Socio, sed la pago de sufiĉa dividendo. Ĉu ni per ĉi tiu eldiro takas la personon? Ne! Li estas ja nur samtempulo, li uzas siajn talentojn por havigi al si bonan lokon en la socio, kia tiu nun estas, kaj li plene rajtas agi tiel.

Kiam ni ĉiloke propagandas alian sistemon, ni neniam celas ataki personon, sed nur la eraran sistemon. Ĉar nur profito estas la celo de la entrepreno, akiro de plejeble granda vendo estas ĉefafero. Ĉi tion oni atingas per akra konkurenco, ĉe kio la prezoj devas esti malpli altaj kaj la kvalito pli alta ol tiuj de la aliaj konkurencantoj. Por bona entreprenisto do ĉefas: kiom eble plej malaltaj produktkostoj, kiom eble plej altaj prezoj. Estas do logike, ke la salajroj, kiuj preskaŭ ĉiam formas la plej grandan elspezon, estu kiom eble plej malataj. Kaj pro tio ke ankaŭ pensio-aranĝoj estas malprofito por la entrepreno, ankaŭ ĉi tiuj estu kiom eble plej malaltaj.

La salajro-batalo kaŭzas senfinajn strikojn; pri tio ni certe ne bezonas daŭrigi, ĉar tio estas afero jam tro konata. Pri pensioj tamen necesas ekzemplo.

Laboristo el unu el la plej grandaj fabrikoj en nia lando (Nederlando), laboris dum 55 jaroj kaj eĉ farigis submastro, tiel ke ne necesas pridubi liajn kapablojn. Kiam li jubileis li ricevis pension je........ *f* 10.80 (la salarjro de nefakulo sumiĝas la kvarobl0. red. E.E.) per kiu sumeto li kaj la edzino devas trabati la vivon. (Certe, maljunuloj ensperas ankaŭ el la ŝtata kaso, sed spite de tio la akraj zorgoj venas post la ..... jubilea festo! La honorkrono havas akrajn dornojn! red. E.E.)

Ĉi tiu ekzemplo ne estas unika. Sed ne turmentu la entrepreniston: lia celo ja ne estas bone prizorgi la lastajn vivojarojn de liaj dungitoj, sed **PROFITO.**

Simpla afero sub la nuna sistemo.

Ĉu la hodiaŭa entreprenisto atentas la intereson de la popolo? Ni memoras pri la ladaj aŭtomobiloj kaj aliaj ludiloj dum la post-militaj monatoj, kiam niaj edzinoj preskaŭ gastiĝis en la butikoj por havigi al si simplan kaldronon. Sed...... la vendado de ludiloj estis pli profitdona.

Ĉu teleroj kaj tasoj? Ho ne, belformaj vazetoj kaj aliaj ornamajoj ĝuis plejan atenton, ĉar tiuj ebligis pli grandan profiton. La Popolo estis **akcesorajo**. Pro tio la Bellamy-anoj kuraĝas diri: la produktrimedojn ni ne povas lasi en la manoj de privatuloj aŭ instancoj, kiuj ne atentas kaj ne celas la bezonon, sed nur la pligrandiĝon de propra riĉo.

Se la gvidantaro de l'Nacio volas kontentige prizorgi la interesojn de la anoj de l'Nacio, tiam ĝi ne povas toleri malhelpon pro la profitĉaso de kelkaj, kiuj pli atentas propan profiton ol la intereson de la tuta popolo.

Ekzemple: Nia registaro tiel aranĝis la pension, ke parto de la premio venas koste de la entreprenoj. Rezulto: laboristoj, pli aĝaj ol 40 jaroj ne plu havas ŝancon trovi laboron. Sub la nuna profitsistemo oni baldaŭ estas „tro maljuna". Ĉu ni per ĉi tio atakas personojn? Ne! Nur la sistemon, kiu stimulas tiajn aferojn! Se fabrikanto aĉetas novajn maŝinojn, li agas tute en la intereso de sia entrepreno: pli bona produkto, malpli da laborfortoj. La entrepeno devas konformiĝi sin je la altiĝanta teknika scienco. Sed la superfluaj fortoj venas koste de la Nacio, kiu devas fari elspezojn pro la senlaboruloj. Eĉ la venanta porsenlaborulasekuro ne povas kontentige solvi tion. La materia kaj spirita mizeroj proksimiĝas; kompetentuloj parolas pri 400.000 senlaboruloj en la jaro 1952. Kaj ĉi tiuj homoj fariĝos ekonomiaj malfortuloj, kiuj malpli povos aĉeti. La vendo de l' produktoj malaltiĝos kaj...... oni devos bremsi la produktadon, maldungi laboristojn.

Tiel ni denove eniros la malbonfaman cirklon el dum la jaroj antaŭmilitaj. La nura solvo estas: divido de la taskaro inter ĉiuj validaj homoj, por ke la rapide progresanta meĥanikiĝo fariĝu ne malbeno, sed beno. Sed, por tio necesas: tuta alnaciigo de ĉiuj produktrimedoj, por ke la mondo ne pereu pro sia lerteco.

Por ebligi aranĝojn favore de nia Popolo necesas, ke la Registaro disponu pri ĉi tiuj rimedoj. Ne la profito, sed la bezono estu la celo! Ne la intereso de kelkaj, sed de la tuta popolo!

P. de W.

---

## Demando kaj respondo

„Ĉu vi, propagandante novan socion, ne malatentas la „pekon"?

Jen demando ne fremda por religiaj homoj. Kiom ajn grava estas ĉi tiu tiu problemo por ĉiu kristano, rilate al la Bellamy-ideo ĝi ne povas esti skrupula. Ni ja ne imagas konstrui socion, konsistantan el nur neerar povaj-homoj.

Ĉiu serioze pensanta homo komprenas, ke la „peko" ne estas eco de difinita homklaso, ke ĝi situas ne en la monujo, sed en la homa koro. La pekproblemo ĉi rilatedo ne de pendas de la ekonomia problemo, ĉar la peko tenos ĝin sub ĉia ajn sistemo.

Alia demando tamen estas kiu sistemo **plej multe stimulas al pekado.**

Kiam ni rigardas la nunan „sociordon", en kiu oni flankenpuŝas la malfortulojn, en kiu regas plej terura egoismo, en kiu oni kuraĝas ĵeti sur sterkejon la bonajn donacojn de Dio, en kiu la konkurencbatalo forrabas la tagan panon de multaj, oni ne povas ne konvinkiĝi, ke pli taŭga ekonomia organizado estas plej urĝa neceso.

Jam la unuaj vortoj el la plej alta preĝo metas sur la ŝultron de la kristano la respondecon pri la sociordo. Ĝi lokas lin nek super, nek sub, sed apud la aliaj infanoj de la Patro.

Vera kristano tial ne senfare povas rigardi la mizeron de siaj proksimuloj. Senfara rigardado estas peka. Tial li **devas elekti!**

Kiam li preĝas: „Vi ne tentu nin", li bone konsciu, ke la nuna ekonomio por multaj enhavas tre grandan tenton, ĉar sub la nuna sistemo malhonesteco povas havigi profiton, pro kio malhonestaj faroj estas allogaj. Kiam li legas pri ŝtelado, ktp., li konsciu, ke kapneoj pri tiuj malbonoj ne sufiĉas, kaj li memoru, ke tiel Stanley Jones kiel Edward Bellamy, ambaŭ kristanoj, signis la vojon al pli bona socio, en kiu materia mizero ne povas ekzisti.

Sciante, ke egala porcio en la prospero signifas la finiĝo de ŝtelado, rabado, jes eĉ ofte de murdo pro profitĉaso, kristano ne serioze povas preĝi la lastajn liniojn el la plej alta preĝo, se li mem rifuzas kunlabori por realigi tiun Preĝon.

Tial kristan-bellamy-ano **ne povas** kaj **ne devas** silenti. ....

Kiu konas la malbonon kaj ne agas, kiu ne kontraŭas la malbonon tiu **pekas!**

Nia idealo do estas konstrui ne senpekan mondon, sed **pli bonan ekonomian sistemon,** bazitan sur principoj, kiujn kristano ne povas ne aplaŭdi.

C.O.

---

## La amara pilolo

Sinjoro Edward R. Stettinius, eksministro de Eksterlandaj aferoj de U.S.A., estas direktoro de la potenca Liberian Corporation, kontrolata de la bankoj de Morgan........ kaj James F. Byrnes fariĝis direktoro de la Newmont Mining Corporation, kontrolata de la sama banko.... kaj Marshall fariĝis direktoro de la Pan American Airways Corporation, giganta trusto, ankaŭ kontrolata de Morgan.

Tiuj knaboj kredeble bone scias kie oni plej sukcese povas fiŝkapti......

Sed inter ni........ se tiaj altrangaj politikuloj serĉas kaŝlokon sub la flugiloj de banko, kion oni do povas atendi de l' registaroj, en kiuj ili partoprenas? Ili sidas sur la konduksido de la ekonomia veturilo! Kaj ...... ili samtempe gardkontrolas l ŝvitantajn tirantojn.

Ili ne volonte vidus la veturilon renversiĝanta, ĉu ne? Tiuokaze ili ja malhavus sian bonan sidlokon...... Estu tiel, „ĉiu por si, kaj la lastan prenu la diablo......"

(Ĉi tiu proverbo estas ne de Edw. Bellamy!)

C.O.




**Nur „Utopistoj" povas kredi en la ekvilibro de la konkurenc-kaj profitsistemo!**

## Hontige, kaj tamen....

Ĵurnalisto, havante la taskon prikanti la benojn de la nuna kapitalisma sistemo, agas prudente tuj iri al porsenlaborula registrejo por enskribigi sin. Ĵurnalisto, havante la taskon raporti pri la malbenoj, ne povas trovi ripozon pro elekt-kaj decidfebro. En ĉi lasta situacio ankaŭ ni minacis perei, kiam ni sidis antaŭ la mapo da artikoloj, raportoj, ktp., kiuj donas plej kaosan kaj pro tio tre klaran bildon pri socio kia ĝi **NE** devas esti! Por ne senfare foruzi nian tempon, ni do abrupte metis la krajonon inter la multnombraj eltondaĵoj kaj eltiris la jenan komunikon:

> „Kune kun letero de la ĉefestraro de la nederlanda organizo „Rajto por ĉiuj korpaj malfortuloj", en kiu oni pledas por baldaŭa laŭleĝa ekzistcerteco por tiuj homoj, la sekretario sendis privatan leteron al la Ministraro. Li informis rifuzi ĉiun manĝaĵon je Kristnaskofesto, se je tiu dato ne ekzistos leĝo kiu plenrajtigos la korpajn malfortulojn.
> En sia letero skribas la sekretario: „Volonte mi oferos mian vivon por atingi laŭleĝan ekzistcertecon favore al ĉiuj korpaj malfortuloj: kripluloj, blinduloj, ftizuloj, ktp., ktp."
> En la letero de la ĉefestraro oni atentigas i.a., ke la akra malriĉo en la familioj de korpaj malfortuloj estas rezulto de antikrista, antidemokrata kaj antisociala-ekonomia sistemo".

Jen, nur unu tre eta floro (?) el la gigante bukedo kiun oni ankoraŭ ĉiam kuraĝas nomi „sistemo".

Kaj tamen.... tamen ni sentas grandan ĝojon, grandan ĝojon pro tio, ke tioman fojon elstare pruviĝis, ke Edward Bellamy ne vane vivis, ke liaj ideoj VIVAS en la koroj de multaj, tre multaj. Volonte, aŭ ne, sed la rezultoj de la malhoma profit-kaj konkurencsistemo devigos ĉiam pli da homoj konfesi, ke la ideoj de Bellamy tute ne estas tiom komplikitaj kaj fantaziaj, kiom ili opiniis!

Jen, kion skribis Edward Bellamy, la „Granda Realisto", jam antaŭ pli ol 60 jaroj:

> „Pli granda intelekto aŭ korpa forto ne rezultas el propra individua povo, sed dependas de la loko kaj talentoj, akiritaj ekster nia volo. La socio ne povas puni korpan aŭ spiritan malfortulon per malpli granda prospero, pro kiu en la nuna socio ankaŭ la familio fariĝas viktimo de tiu maljusto".

**Amassenlaboreco estas la logikaj kaj neeviteblaj rezultoj de ekonomio, kiu malatentas la ekvilibron inter produktado kaj konsumado.**

# Mil kvincent guldenoj!

Ie sur insuleto apud Nov-Zelando laboras juna nederlanda kuracisto. Tie li instalis malsanulejon por 50 leprulo]. La Servo por Popolsanigo subvencias lian laboron. Lepro estas terura malsano, kaj en la pasinteco oni ekzilis la pacientojn el urboj kaj vilaĝoj. Feliĉe de scienco ankaŭ ĉiafere atingis grandajn sukcesojn, sekve oni sukcese povas resanigi pacientojn.
Por tio necesas medikamentoj, el kiuj „Promin" estas unu el la plej gravaj.
La Servo por Popolsanigo multe faris, sed „Promin" ĝi ne povas havigi al la kuracisto, tio kostas tro multe da valutoj. Por la 50 pacientoj la kostoj estas ĉiujare mil kvincent guldenoj.
La kuracisto nun devas almozpetadi ĉe privatuloj!
Mil kvincent guldenoj. Oni frotas al si la okulojn, tian sumon Nederlando ne povas malhavi! Sed por la soldataro en Indonesio oni ne atentas milionojn. Kaj kiom la ŝtato elspezas pro la multnombraj alt-kaj nealtrangaj reprezentantoj? Kaj pro la same multaj vojaĝoj per flugmaŝinoj? Mallonge, la tuta, grandega aparato, kiu ĉiutage funkcias por kaosigi (pardonon, mi celas aranĝi) la situacion?
Sed tiuj mil kvincent guldenoj, ne, tiu elspezo estus tro riskoplena! Iom ŝanĝante malbonfamkonatan devizon ni ĉi afere povus diri: „Unue kanonojn, post Promin".
Tutkompreneble, kial do oni povas havi la absurdan ideon por lepriĝi!

El „Voorlichting",
Hago, Nederlanda.

# NI KUNE

„Mi okupas min pri nenio, nek pri politiko nek pri ekonomio, mi preferas resti sendependa. Kion faras aliaj, tion ili mem sciu. Mi povas stari sur propraj piedoj!" parolis la dentisto, pretigante sian turmentilon. La viro en la seĝo kuraĝis ne konsenti kun li.
„Tion vi nur imagas! Sen la helpo de aliaj vi ja ne povas ekzisti. Kiu faris tiun borileton? Ĉu ne estas la teknikistoj, kiuj ebligas al vi labori? Via borilo turniĝas elektre. Kiel ĝi povus funkcii se fakuloj ne pretigus vian instalajon? La energio el la centra elektrejo ne atingus vian domon, se la tieaj laboristoj ne farus siajn devojn. Kio vi do estus sen tiuj homoj? Ankaŭ estus neeble por vi prizorgi mian dentaron sen kemiajoj, sen vatoj kaj bandaĵoj. Tiun blankan jakon vi ne surhavus, se la ŝpinisto kaj la teksisto, la butonisto kaj la tajloro kaj la gladistino ne estus okupintaj sin pri ĝi.
Vian konon vi akiris el libroj, super kiuj laboris ankaŭ paperfaristoj, presisto kaj verkisto. Mallonge, kara mia, via kono estas bazita sur la kono de aliaj, via laboro sur la laboro de aliaj. Vi povas esti neniom pli aŭ malpli ol membro de la Komunumo kaj ĝui la fruktojn de la komuna laboro. Vi je eĉ ne povus paroli kun mi, se vi kiel infano ne estus lerninta la lingvon kaj parolon de aliaj. La nivelo de nia civilizo estas heredajo de la antaŭaj generacioj, sinjoro. Ĉu plaĉas al vi aŭ ne, vi estas kaj restos ero de 'l Komunumo, sen kiu vi ne povas teni vian civiliznivelon.
„Kaj tamen mia laboro estas pli inda ol tiu de farmisto".
„Tion vi nur imagas! Mi preferas malhavi dentistojn ol farmistojn! Kian utilon dentoj ja havas, se mankas manĝajo? Kiam vi ankoraŭ estis studanta, tiu farmistfilo jam okupis sin pri la produktado por nia Komunumo. Kaj en via studĉambreto certe estis pli da komforto ol sur la malvarma kampo, en la stalo aŭ sur la sterkejo. Tiurilate tiu farmisto pli rajtas pli grandan porcion el la prospero ol vi".
„Kaj nun, bonvolu malfermi la buŝon...."
„Unue diru: kiu pravas, mi aŭ vi?"
Li ridetis. „Mi ne multe povas argumenti, tion vi ja bone scias! Atentu!"
Akresone la borilo iris en la vangodenton. Sed kiam la paciento foriris, la dentisto akceptis la propagandilon kaj permesis studi ĝin.

C.O.

# En la vagonaro

La sinjoro en la angulo nepre rifuzis akcepti la gazeton proponitan al li.
„Ho, sinjoro, ne utilas, mi jam havas firman konvinkon".
„Ĉu vi konas la Bellamy-ideon?"
„Ne. Kaj mi ne bezonas koni ĝin, ĉar mi jam havas firman konvinkon: Vi lasu al ĉiu propran opinion".
„Komprenu, sinjoro, mi estas ĝisosta Bellamy-ano. Sed se iu povus konvinki min pri tio, ke ekzistas io pli bona, tiam mi tuj surirus la novan vojon. Estas ĉies devo sekvi la plej klaran lumon".
„Tion mi tute ne volas nei. Sed mi ja havas propran opinion".
„Permesu al mi nemodestan demandon: Ĉu vi estas Roma-Katoliko?"
Ridetante li kapjesis.
„Nu do, se ĉiu homo havus tian firman konvinkon kian vi, kian utilon tiam havus la misio? Dum la pasintaj balotoj mi vidis afiŝojn ankaŭ de via partio. Kiucele? Por ŝanĝi la konvinkon de aliaj, mia kara! Mi do certe rajtas diri, ke via sinteno ĉiafere ne ĝustas".
„Sed vi ja ne povas konvinki min pri via vero?"
„Tio ankoraŭ ne estas pruvita, ĉar vi ne scias pri ĝi.
Ni jam estas en Amsterdam.... Bedaŭrinde. Permesu al mi ankoraŭfoje proponi mian gazeton. La legado ne malutilos al vi. Estas pli da samideanoj viaj en niaj rondoj".
Li akceptis la organon!
„Mi legos ĝin, sinjoro, rekomence por via persista propagando".

C.O.

# Vivu la egoismon!

Egoismo, jen denove tuj rekrutita vorto kiam temas pri nekonsento kun Bellamy-propagandisto.
Ho, ni konas la „kaptilon"! Kiam ni klopodas konvinki t.n. intelektulojn pri la urĝa neceso de nova socio, de Bellamy-socio, preskaŭ ĉiam venas la demando: „Sed ĉu vi ne opinias, ke la homa egoismo evidentiĝos grava barilo por la kreo kaj sukceso de l' Bellamy-socio"?
Fermiĝis la kaptilo! Kaj triumfe nia intelektulo atendas la respondon. Kaj...... iom ĉagrene pro la konstato, ke oni ŝajne ne kapablas vidi diferencon inter la sistemo kaj la homo, ni do tioman fojon ripetas nian respondon:
„Kontraŭe. Sana egoismo ne povas ne instigi la homon serĉi elirejon el la kaoso kaj preferi la novan ŝipon ol la alfundiĝantan kadukajon. Lia egoismo preferas konstantan laboron ol senlaborecon, kaj stabilan salajron ol salajron nestabilan pro ĉiaj kaj ĉiamaj deprenoj. Lia egoismo preferos pacan kaj prosperan socion ol sistemon, kiu nepre kondukas al plej kruelaj militoj interpopolaj, kaj al ekonomia milito ĉiutaga en ĉiuj landoj aparta.
En la nuna produktsistemo la prospero de la unua baziĝas sur la mizero de la alia. Tamen ne la mizero de la alia estas la celo, sed la propra bonfarto. Kio nun ofte ŝajnas nura egoismo, fakte estas nur timo pro la propra vivekzisto, kaj pro la estonteco de l' ideoj. Sana estos la egoismo kiam oni partoprenos la novkonstruon kaj stabilizon de sociordo, kiu garantios al vi kaj viaj infanoj, de la lulilo ĝis la tombo, porcion el sia prospero"!
Ni nomu katon kato! Kiam kato amĉasas ni ne laŭdas ĝian belan kantvoĉon! Kiam senlaborulo forprenas iom por sia familio, ni ne diras:
„Kia egoisto, li volas havi ĉiom"!
Ni do diru plenvoĉe: VIVU LA EGOISMON!

**SANA ETIKO**
**SANA EKONOMIO.**

**La produktrimedoj posedo de la homsocio, bazita sur EKONOMIA EGALECO per produktado laŭbezona kaj distribuado de l' aĉetpovo, jen la principoj kiuj kondukas al:**

**PACO, FELIĈO, BONFARTO.**

# PLENUMITA ANTAUDIRO

Sur la provkampoj de Gorki en provinco Moskou oni faris provojn per elektra falĉdraŝmaŝino. Estas maŝino de la tipo S.4, en kiu estas metita elektra motoro anstataŭ motoro funkcianta per interna bruliĝo. Kiel havigi elektran energion al ĉi tiu maŝino, kiu devas esti transportebla trans grandaj distancoj? La saman problemon oni devis solvi kiam oni eksperimentis per elektraj traktoroj, kiuj havas la avantaĝon, ke ili povas pli rapide veturi kaj estas malpli bruldanĝeraj. La falĉ-draŝmaŝino akiras la bezonatan energion per fleksebla kablo, kiu per transportebla transformatoro povas esti ligita je ĉiu dezirata loko en la elektra reto.
La longo de la la kablo estas tiom, ke 250 hektaroj da grenoj, fazeoloj, olehavaj kreskajoj, ktp., povas esti rikoltataj de el unu alligo sur la reto. La maŝinon oni povas bone kaj rapide manovri.
La Sovjet-inĝenieroj deklaris, ke la plialtiĝo de la produkteblo de l'agrikulturo, rezulto de ĉi tiuj novaj eltrovoj, ankoraŭ ne estas taksebla.

**El „De Waarheid".**

Oni relegu la linionjn en „Equality", kie Edith Leete plenumas sian devon kiel etrkulturistino! Kaj tioman fojon oni konstatos:

**BELLAMY PRAVAS!**

# SUR LA PRAMO

„Ĉu vi legis, ke ni baldaŭ denove devos uzi niajn ŝirmejojn?" demandis unu el la grupeto ,staranta apud la kamentubo.
„Ho vi, ne maltrankviliĝu!" diris alia. „Ĉu vi kredas, ke ili estas tiom frenezaj por denove komenci.... Ili ja ne ankoraŭ, povas forgesi la jus pasintan mizeron".
„Ĉu vi opinias, ke la uloj, kiuj tion aranĝas, suferis?"
„La tuta politiko estas por mi tiom klara kiom koto...." unu melankolie diris.
„Ne hontu pro tio: la ministroj ja scias pri tio tiom kiom vi! Sabate ili juras, ke malaltiĝo de monvaloroj ne okazos, kaj dimanĉe la guldeno havas nur duonan valoron! Veturo al Ameriko ŝanĝas ĉiujn aferojn, ĉu ne?
„Miaopinie, se vi tie devas aranĝi ion, vi certe havas bonan ŝancon", asertis alia.
„Tie ili manovras plej strange. Apenaŭ forfalis kelkaj milionoj da soldatoj pro libereco kaj demokratio, kaj ili liveris armilojn al Franko! Kaj rilate al Ĉinio: Amerikaj ŝipoj rompis la blokadon de la Nacionaloj por servi la komunistojn.... Kaj en ilia propra lando komunisto estas homo nedezirinda.... Bonvolu solvi la enigmon!"
„Ho viro, ja temas nur pri la karaj moneroj, tion vi ja devas scii! Kiam temas pri profitoj, ili ne plu memoras pri idealoj, nek pri amo je l' patrolando! Ĉiuj tiuj malbonoj estiĝas pro la profit-sistemo, ĉu ne, samideano?"
„Kiel vi diris.... Nu, rigardu la aferojn. Ĉu vi ne legis, ke oni ĉi tie en nia lando konfiskis kvanton da ferajoj kaj trovis armilojn? Ĉu vi eble opiniis, ke tia fabrikanto havas intereson pri la findestino de l' mortigiloj? Se li profitas, li ja kontentas. Mortigoj kaj raboj ja riĉigas lin. Estas karuloj, tiuj armilfabrikantoj. Komercnazon ili havas, sed pri konscienco vi ne parolu...."
„Kaj kiam vi sidos en via ŝirmejo, ili denove multe profitos!" unu mokdiris.
„Sed kion ni povas fari?" diris la timemulo.
„Batali!" laŭtvoĉe diris la Bellamy-ano.
„Senfare rigardi kio plue fariĝos, ne, tion vi ne faru. Sed helpu nin faligi tiun teruran profitsistemon! Komprenu do, ke la ekonomiaj problemoj antaŭas ĉiun militon. Pli ĝuste: la profitsistemo!"
„Sed kion do ni povas fari?" li diris hezite.
„Kion vi volas fari tute ne interesas min! Ho, rapidu al via ŝirmejo! Sed mi, mi batalos kontraŭ la kaŭzo de la mizero".
„Vi neniam sukcesos, sinjoro!" unu mokdiris.
„Tutegale!" koleris la propagandisto. „Sed tiokaze mi almenaŭ batalante cedos, kaj ne malkuraĝe sufokiĝos en ŝirmejo! Mortintoj ne konstruos novan socion! Homo, vekiĝu!"
Huuuuh! sonis la fajfilo.
Tiam ili denove eksaltis sur la biciklojn kaj rapidis al la laborejoj, unu plentima, la alia indiferenta kaj unu bolanta pro indigno pri la indiferenteco kaj malaktiveco de la aliaj. C.O.

# DIABLE . . .!

Ke oni do ĉesu pri tiu ĉiama „utopio"! skribis nia amiko Fodoso. Ja tute ne temas pri „utopio", kontraŭe, temas pri REALO! Jakobo, mi asertas, ke tiuj eternaj „utopiuloj" legis eĉ ne unu linion el la verkoj de Bellamy! Mi enmetas du ekstraktojn kiuj plene atestas pri la „realsento" de Ballamy. Jen:
„Sro Leete: En ĉiaj profesioj la danĝero al vivo kaj sano reduktiĝis ĝis minimumo. La estraro daŭre pristudas la metodojn por allogigi la malpli agrablajn profesiojn per privilegioj kiaj ekzemple: pli da libera tempo. Se estas profesio, kiu, kvankam plenumenda de neniu estas dezirata, oni laŭvice dum mallonga tempo ĝin plenumas.
Julius West: Ĉu ekzemple, la purigado kaj riparado de la kloakoj estas tia profesio?
Sro. Leete: Se tiu laboro ankoraŭ estus tiom malpuriga kiom en viaj tagoj, ĝi estus farata laŭvice; sed niaj kloakoj estas tiom puraj, kiom niaj stratoj. Ili entenas nur akvon, kiu estas ĥemie purigata kaj krome tute senodorigata de aparato, kiu troviĝas en ĉiu domo. Tiu sama aparato elektre cindrigas ĉiajn ne plu uzitajn materialojn. Tiu ĉi plimodernigo de l' kloakaro realiĝis tuj post la granda revolucio, sed sen ĝi certe estus prokrastita jarcenton, kvankam jam delonge oni sciis kiel apliki la metodon. Tiu estas nur unu ekzemplo el miloj pri ĉio, kio estas farita por forigi malpuran kaj danĝeran laborojn. La mondo ne pensus pri tiaj plibonigoj, disponante pri sklavoklaso al kiu oni povas ordoni tiajn malagrablajn taskojn."
Julius West: „Tutcerte ankaŭ ekzistas malsaĝuloj, kiuj ne konsentas la nunan situacion, nek agnoskas siajn sociajn devojn. Se tia homo simple rifuzas labori, kion do fari kun li? Kompreneble vi havas rimedojn devigi tiajn homojn, ĉu ne?
Sro. Leete: Tute ne. Se nia sistemo ne favorus la komunan bonfarton, ĝi devus malaperi. Nia leĝo simple diras, ke tiu, kiu rifuzas kontribui al la komuna prospero, ankaŭ ne ĝuu ĝiajn avantaĝojn. Tio estus maljusta kontraŭ la aliaj civitanoj. Sed labordevigon opinius nia popolo abomeninda. Antaŭ ĉio la servo por la ŝtato estas honordevo. Samkiel viatempaj soldatoj rifuzis kunlabori kun sionoj, niaj laboristoj rifuzas labori kun tiuj, kiuj klopodas eviti siajn devojn.
Julius West: Kiel do vi agas koncerne ilin?
Sro. Leete: Se ne estas krimuloj aŭ frenezuloj, oni donas al ili tiom da semoj kaj iloj, kiom ili deziras. Krome pecon da tero, kie ili laŭdezire povas vivi. Ni kredas nian sistemon bona, sed ni volonte aŭskultos, se iu scias pli bonan. Ni simpatias al ĉiaj eksperimentoj sur tiu tereno".

## Por Korespondemoloj

Tarifo por simpla anonco: 2 intern. resp. kuponoj.
V. Eronen, Kerkoo, Finlando, deziras korespondi pri nova nomo kaj trikotkostumo.

**MILITO KAJ PACO?**

**Sed kiuj estas la malamikoj de la nacio? Ĉu estas francio, germanio, aŭ anglio aŭ malsato, malvarmo kaj mizero? Militoj ne plu estas kaj la registaro havas ne la taskon militi, sed ŝirmi ĉiun.**

**El „Rigardante malantaŭen".**

**Ne la t.n. homa egoismo kulpas pri foresto de pli bona sociordo, sed la mallerteco de l' granda amaso, kiu ankoraŭ ne lernis plej celtrafe apliki sian egoismon.**

## Kruela estas la nuna sistemo

ĉar ĝi punas la edzinon kaj la infanojn se la patro estas mense aŭ fizike malforta;
ĉar ĝi permesas, ke la granda komercisto forprenas la panon de la malgranda per „honesta" konkurado;
ĉar ĝi povas lasi vidvinojn kaj orfojn en malriĉeco;
ĉar ĝi malebligas, ke miloj da homoj montru sian povon kaj devigas la talentulojn al laboro, kiu por ili estas malinda;
ĉar ĝi kondamnas centmilojn al ruiniga senlaboreco;
ĉar ĝi vivegas maljunulojn en zorgo kaj mizero.

## Tial ni instigas vin

al batalado por enkonduko de la nova ekonomia sistemo laŭ Edward Bellamy, kiu garantias

PROSPERON POR ĈIUJ

per justa dividado de la laboro inter ĉiuj laboruloj laŭ iliaj talentoj kaj fortoj;
per justa dividado de la produktajo, donanta egalan porcion al ĉiu homo, de la naskiĝo ĝis la morto.

## Al niaj Germanaj membroj

Kun bedaŭro ni devas komuniki, ke ni devis anstataŭigi nian peranton, amiko Karl Hunold. Ĉu okazis io, ĉu li malsaniĝis, mortis? Ni nur scias, ke li dum longa tempo ne plu respondis al niaj leteroj. Tio tre ĉagrenas nin, ĉar amiko Hunold ĉiam estis tre aktiva peranto. La ĝisnuna situacio tamen ne povas daŭri.
Feliĉe ni trovis nian amikon Karl Karger, kiu jam plurfoje pruvis esti aktiva batalanto por nia idealo, preta transpreni la perantecon.
Krome ni atentigas, ke la kotizo por 1950 estas R.M. 3.
Bonvolu bone noti la adreson:
Karl Karger, ((22.b) SCHIFFERSTADT, Behelfsheim 49/50.

## E K O-Centro

Karl Karger (22.b) SCHIFFERSTADT, Behelfsheim 49/50 (okcidenta germanio) propagandas la establon de Esperantista Feriohejmo — servas kiel IAPK-ĉefagentejo al filatelistoj — kaj provas fondi lokajn Bellamy-rondojn. Subtenu ĝin per alsendo de municio (resp. kuponoj, gazetoj, libroj, poŝtmarkoj kaj propagandiloj).
Responde vi ricevos EKO-informilon kun kvitanco pri la sendaĵo.

**Ni disponas pri sufiĉe da scienca kono por havigi al ĉiu el la du miliardoj da homoj sufiĉan nutrajon, sed.... tri kvaronoj de la homaro...... tio estas 1500.000.000 viroj, virinoj kaj infanoj! ......ricevas NE sufiĉe!!!**